Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj 56 en Klaipėda, Litovio

# LUMTURO

Redakcia retadreso: chojus@gmail.com
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

**N-RO 1** | 2022 07 09, sabato

## Salutmesaĝoj

**Viktorija ČMILYTĖ-NIELSEN,**
**Prezidantino de Litovia Parlamento**



**Estimataj esperantistoj,**
la internacia lingvo Esperanto estas unika fenomeno.
Lingvo, kreita de homo, sekve artefarita produkto. Kiam ni diras „artefarita“, ni plej ofte pensas pri io „nenatura“, „nepropra“, „nesincera“.
Tamen la lingvo Esperanto estas eksterordinare viva, subtila kaj esprimriĉa. Venkinte la sovetan malpermeson kaj aliajn obstaklojn, ĉi tiu lingvo jam 135 jarojn unuigas la homojn, kiuj parolas malsamajn lingvojn, ĝi instigas egalrajtan kaj demokratian interkomunikiĝon, ankaŭ disvastigas pacon. Por litovoj ĝi estas kara kaj unika ankoraŭ pro tio, ke ĝin kreis la fama litvako Ludoviko Lazaro Zamenhof.
Mi dankas Vian komunumon por tio, ke vi, flegante la lingvon Esperanto, vi plivastigas kulturan kunlaboradon en la Baltia regiono, en Eŭropo kaj en la tuta mondo, popularigas Litovion en internacia vastaĵo.
Mi deziras al vi sencoplenajn kaj fruktodonajn aranĝojn dum BET-56!


**Jurgita Šiugždinienė,**
**ministrino pri klerigo, scienco kaj sporto**



**Estimata esperantista komunumo,**
mi salutas vin jam 56-an fojon kolektiĝinta por Baltiaj Esperanto-Tagoj, por la festo de flegantoj de tiu unika lingvo.
Scio de lingvoj kunigas diversajn popolojn kaj ŝtatojn. Ĝi certigas reciprokan estimon kaj toleremon, konstruas pontojn inter diverskulturaj homoj. Estas ĝojige, ke ni havas komunumojn, kiuj sincere zorgas pri flegado de la lingvo kaj kapablas unuigi samideanojn en la mondo. Subtenante ĉi tiun tradicion vi havigas eblecon ĝoje interkomunikiĝi per la lingvo internacia kaj popularigi ĝin.
Mi deziras al via komunumo fieri pri tiu kultura heredaĵo, ĉiamaniere flegi kaj konservi la trovitan senton de komuneco. Nur dank' al via komunumo kaj senlaca entuziasmo la famo pri la lingvo Esperanto disvastiĝas tra la tuta mondo, ankoraŭ pliproksimigas kaj pliriĉigas ĝin.

## Salutmesaĝoj

**Duncan Charters, Prezidanto de UEA**



Post la neevitebla trijara paŭzo en la ritmo de la ĉeestaj Baltiaj Esperanto-Tagoj, revenis la vico de litovaj esperantistoj gastigi BET-56 post la sukcesa 2019-a realigo de BET-55 en Panevėžys. Kia ĝojo por vi denove renkontiĝi persone. Precize pro tio mi celis mem viziti unu el la plej inspire sukcesaj aranĝoj de la esperantistoj, laŭ via konata reputacio. Tio estas por mi kunvalidigo, kun la Estraraj kolegoj de UEA, kiuj jam subtenis vian agadon, la sponsoradon, kiun ni akceptis kaj kiun vi plene meritas. Ekde la iniciato de la granda eksperimento de 1905 en Bulonjo-ĉe-maro, la Universalaj Kongresoj de Esperanto montris modelon por renkontiĝoj de parolantoj de nia lingvo. Jam antaŭ pli ol sesdek jaroj Baltiaj esperantistoj vidis kiel tiaj renkontiĝoj povos plifortigi niajn konvinkojn, niajn amikecojn ne limigitajn de etnoj kaj nacioj, nian ĝuadon de vivo kun la tute specialaj privilegioj, kiujn donas al ni nia tergloba lingvo. Nun en nia Klaipėda-ĉe-maro la BET-anoj denove spertos per freŝaj okuloj kaj rekta interagado la unikajn avantaĝojn de komunikado en nia lingvo.

Sojle de nova strategia planado de UEA mem, ni deziras ke vi profitu la okazon por dividi kun ni viajn ideojn, pensojn, konvinkojn pri la estonteco de nia movado. Pandemio estas evidente malagrabla defio por la homaro, tamen en la historio montriĝis fenomeno, kiun pluraj prelegantoj ankaŭ per Esperanto analizis en interŝanĝoj pri "pozitivaj efikoj de la pandemio": pli da kreemo kaj inventemo por solvi mondajn problemojn; plispertiĝo pri la uzado de teknologio por kunigi kaj partoprenigi individuojn kiuj restis ekster niaj aktivaj rondoj pro nekapablo vojaĝi; konscio ke tio, kio nun unuigas, povas esti pli forta ol la elementoj, kiuj nin dividas; pli vastaj elmontroj de bonkoreco al suferantoj kaj al niaj kunhomoj ĝenerale; pli da konscio ke por havi pacan mondon necesos ke la popoloj kuniĝu preme al konfliktosolvado por malakceptigi la ideon de perfortado kaj detruado kiel necesaj por solvado de kolizioj de interesoj inter la popoloj kaj iliaj registaroj.

Ĉu atendas nin brila nova rolo en nia mondo? Se jes, BET estu kerno en tiu rolo, montrante ke ni povas kunpensi, kune plikleriĝi, kunestimi niajn kunulojn, kaj ne forgesi ĝui nian kunestadon en bela esplorinda nova loko... vi komprenis la mesaĝon!

## Kial LUMTURO?

*Jen estas la klarigo de la ĉi-informila nomo LUMTURO.*

De antikvaj tempoj la lumturoj estis konstruataj sur marbordoj por indiki la danĝerajn lokojn kaj ankaŭ por helpi orientiĝon al la ŝipanoj. Eĉ hodiaŭ, kiam estas uzataj plej modernaj navigiloj, la lumturoj ne perdis sian signifon.

Elektinte por nia informilo la nomon LUMTURO, ni opinias, ke ankaŭ ĝi povas esti kvazaŭ orientilo. Nuntempe ni travivas la KOVIM-pandemian nokton, kiu grave komplikigas niajn vivojn. Do ankaŭ ĉi tiu kunflugo de esperantoj firmigu la komprenon: ĉio, kio havas la komencon, havas ankaŭ la finon. Sekve finiĝos ankaŭ la pandemio!

La litova poeto Maironis iam versis: ***ideoj, se grandaj, ne mortas kiel homoj***. Tion pruvu ankaŭ kolektiĝintoj ĉe nia LUMTURO.

**Petras ČELIAUSKAS**



## Programo

**La 8-an de julio (vendredo)**

10.00–22.00: Registrado de partoprenantoj, loĝigo, informoj (en la universitata konstruaĵo n-ro11 Aula Magna)

**La 9-an de julio (sabato)**

09.00–22.00: Registrado de partoprenantoj, loĝigo, informoj (samloke)

13.00–14.00: Tagmanĝo (memstare)

18.00–19.00: Vespermanĝo (memstare)

19.30–20.00: Komuna organiza kunveno de BETanoj (en la ĉefa salono de la universitata konstruaĵo n-ro 6)

20.00–21.00: Koncerto (samloke)

**La 10-an de julio (dimanĉo)**

09.00–10.30: Matenmanĝo (en la konstruaĵo n-ro 11)

10.30–11.00: Organizaj kunvenoj de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj, gvidantoj kaj prelegantoj de la Somera Universitato, gvidantoj kaj prelegantoj de SUS-38 de AIS, gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj (en la ĉefa aŭditorio de la universitata konstruaĵo n-ro 11)

11.00–12.00: Malfermo de la Somera Universitato; la unua prelego el prelegciklo de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (aŭditorio 1 K en la konstruaĵo n-ro 11)

11.00–12.00: Inaŭguro de SUS-38 de AIS; la unua prelego de prof. Amri Wandel el la triprelega kurso “Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb” (aŭditorio 2 K en la konstruaĵo n-ro 11)

11.00–13.00: La unuaj lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (aŭditorioj n-roj 111, 119, 314, 315 en la konstruaĵo n-ro 5)

12.00–13.00: Prelegociklo pri esperantologio de prof. Ilona Koutny; la unua prelego: “Esperanto inter la naturaj lingvoj” (aŭditorio 1 K en la konstruaĵo n-ro 11)

12.00–13.00: Prelegserio de prof. Duncan Charters pri kulturo; la unua prelego: “Komunikado: persona, publika kaj interkultura” (aŭditorio 2 K en la konstruaĵo n-ro 11)

13.00–14.30: Tagmanĝo (en la konstruaĵo n-ro 11)


15.00–16.00: Solena inaŭguro de BET-56; en la urba koncerta salono (strato Šaulių n-ro 36)

16.00–17.00: Urba koncerto por la partoprenantoj de BET-56 (samloke)

17.00–18.00: Eventuala akcepto por la partoprenantoj de BET-56 (samloke)

18.30–19.30: Vespermanĝo (memstare)

20.00–22.00: Libera vespero




1. Senato, 2. Rektorejo, 3. Financa kaj ekonomika direkcio, 4. Sanscienca fakultato, **5. Marteknologia kaj naturscienca fakultato**, **6. Aŭlo**, 7. Klajpeda scienca kaj teknoliga parko, **8. Studenta domo**, 9. Komerca inkubatoro, 10. Maresplora instituto, **11. Aŭditoria korpuso** “Aula Magna”, S. Loko de la informstando


## Novaj aliĝoj

239. Elzė KELIAUSKAITĖ, Litovio
240. Martin SEDLAK, Ĉeĥio
241. Christian DARDENNE, Francio
242. Irena BUTNORIENĖ, Litovio
243. Guillem Portell VERGES, Katalunio
244. Diemantė ANIČIENĖ, Litovio
245. Aldis CILINSKIS, Latvio
246. Vytautas TAMOŠIŪNAS, Litovio
247. Dorota SZCZYGIEL, Pollando

(daŭrigota)

### Kiel atingi la koncertan salonon

Dimanĉe okazos la solena inaŭguro en la urba koncerta salono, kiu situas en la strato Šaulių gatvė 36. Ĝi troviĝas ĉirkaŭ 1 kilometron de la universitato kaj atingeblas perpiede.
**Itinero:** https://goo.gl/maps/ebMWWpEtqWnhmLuK6




### Rekomendataj aplikaĵoj

Rekomendataj estas du aplikaĵoj por tiuj, kiuj kutimas uzi sian telefonon por veturo. Unu estas Trafi kaj la alia estas Bolt.

La aplikaĵo Trafi estas ĉefe uzata por publikaj amastransportiloj en Litovio. La aplikaĵo Bolt estas populara por taksio.

Trafi Bolt

## Utilaj informoj

### Gravaj litovaj vortoj kaj frazoj

Saluton – Sveiki [svejki']
Bonan matenon – Labas rytas [la'bas ri'tas]
Bonan tagon – Laba diena [laba' djena']
Bonan vesperon – Labas vakaras [la'bas va'karas]
Dankon – Aèiû [a'æju]; dëkui [de'kuj]
Multan dankon – Aèiû labai [a'ĉju labaj']
Ne dankinde – Nër uþ kà [ner uĵ ka']
Mi petas – Praðau [praþaŭ']
Bonvolu – Praðom [pra'ŝom]
Mi dankas – Dëkoju [deko'ju]
Mi pardonpetas – Atsipraðau [atsipraŝaŭ']
Pardonu – Atleiskite [atlejs'kite]
Ĉion bonan – Viso labo [vi'so la'bo]
Ĝis revido – Iki pasimatymo [iki' pasima'timo]
Adiaŭ – Sudie [sudje']
Jes – Taip [tajp]
Ne – Ne [ne]
Bone – Gerai [geraj']
Tre – Labai [labaj']
Malbone – Blogai [blogaj']
Mi volas – Að noriu [aŝ no'rju]
Mi ŝatas – Að mëgstu [aŝ meg'stu]
Mi ne komprenas – Að nesuprantu [aŝ nesuprantu']
Kafo – Kava [kava']
Teo – Arbata [arbata']
Biero – Alus [alus']
Kafejo – Kavinë [kavi'ne]
Trinkejo – Baras [ba'ras]
Restoracio – Restoranas [restora'nas]
Kiom kostas – Kiek kainuoja [kjek kajnŭo'ja]

**Saluton, karaj BET-anoj !**

Kiel kutime, ankaŭ dum **Baltiaj Esperanto-Tagoj 56** en Klaipėda aperos la ĉiutaga informilo, ĉi-foje kun la nomo ***Lumturo*** (la klarigo en la dua paĝo). En ĝi vi trovos aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-56, fotojn, k.s.
Ĝia enhavo dependos ankaŭ de kontribuoj de BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj, kursoj ktp, kaj poste aŭ metu siajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete (prefere) al: ***chojus@gmail.com***.
Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel anekdotoj kaj rakontoj pri BET. Ĉiuokaze bonvenon al Klaipėda, kaj ĝuu la 56-an BET-on!

**CHOE Taesok, redaktoro**